



la informilo

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:


ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
4^e trim. 1980
N° 32



abonnement
un an: 14 F
UNU JARO: 14 F
(8 INTERN. KUPON.)

ANTO....FLASH*ESPERANTO.... FLASH*ESPERANTO

Shakespeare... ☆ L'UN DES AUTEURS LE PLUS TRADUIT EN ESPERANTO!

Sous les auspices de U.E.A. et de l'UNESCO, dans le cadre de la série littéraire "Orient-Occident", une édition bilingue anglais-espéranto des "sonnets" de W. Shakespeare va bientôt enrichir le fonds commun des grandes oeuvres mondiales publiées dans la langue universelle. La traduction en a été effectuée par W. AULD, Président de l'Académie Internationale d'Espéranto. Au même moment une traduction de la pièce "Richard III" vient également combler les admirateurs du grand drama-turge anglais.

L'O.N.U. et l'espéranto ☆

Unuigintaj Nacioj, Novjorko
Oficejo de Publika Informado



Depuis plusieurs années déjà la "Déclaration Universelle des Droits de l'Homme" fait l'objet d'une diffusion systématique dans un grand nombre de langues dont l'espéranto. Selon un récent accord conclu entre l'Association Universelle d'Espéranto et l'Organisation des Nations-Unies, cette dernière vient également d'éditer sa charte en langue internationale.

ĈARTO
de
UNUIĜINTAJ NACIOJ

kaj
STATUTO
de la
INTERNACIA KORTUMO

**kun nia neelĉerpebla optimismo
ni daŭre fidos en 1981
nian blankan birdon!
ĝi alportu al vi
FELIĈAN JARON...**





LA DISCOTHEQUE ESPERANTISTE S'ENRICHIT ★

"Karnavalo en Rio", 4 excellentes mélodies à chanter et à danser, très faciles à mémoriser. Ce 33 tours stéréo qui bénéficie par ailleurs d'une orchestration particulièrement étudiée, sera une bonne idée de cadeau de fin d'année. On peut se le procurer auprès de notre service de librairie.

LYDIA ZAMENHOF... ★

Sa vie, sa contribution à la diffusion de l'Espéranto. (Editions STAFETO, Bruxelles) Un grand nombre d'espérantistes français du "3ème âge" doivent leur découverte de l'espéranto au prosélytisme permanent de Lydia, fille aînée du Dr Zamenhof, véritable ambassadrice itinérante de la langue internationale. Elle sillonna un grand nombre de pays d'Europe y compris la France où elle guida une série de cours publics. Elle mourut au camp de Treblinka, de même que sa soeur. Son frère Adam, le seul fils de Zamenhof fut fusillé en 1940.

LE PROJET DE LOI PRO-ESPERANTO ET LA PETITION EN COURS ★

Lancée récemment par notre Fédération la pétition de soutien au projet de loi sur l'enseignement optionnel de l'espéranto, déposé à l'Assemblée Nationale, rencontre un accueil très favorable. Près de 1500 signatures ont déjà été recueillies et la quasi-totalité des personnes sollicitées, après information, approuvent le bien-fondé de ce projet. La collecte des signatures se poursuit durant les prochains mois.

L'ESPERANTO, 3ème LANGUE DU 9ème CONGRES INTERNATIONAL DE CYBERNETIQUE DE NAMUR ★

Un quart des conférences ont en effet eu lieu en espéranto utilisé pour la première fois comme langue officielle de travail, parallèlement au français et à l'anglais. Une démonstration technique suscita par ailleurs l'intérêt de tous les participants: convenablement préprogrammé, un ordinateur capable de parler et d'enseigner la langue mondiale... et de traduire en anglais des textes d'espéranto!

L'ESPERANTO SUR LES ONDES ★



Les profanes -ou les sceptiques- apprennent toujours avec une certaine surprise l'existence d'émissions régulières en espéranto, émanant aussi bien de Radio-Varsovie que de Radio-Pékin. A leur intention, nous insérons dans ce numéro le calendrier récemment mis à jour de ces émissions. Un grand nombre est parfaitement reçu en France si l'on possède un récepteur approprié... (un appareil à ondes courtes à bandes dites "étalées" promet les meilleurs résultats).

L'ORGANE DE PRESSE BRESILIEN "Jornal dos Congressos"... ★

... vient de réserver près d'un mètre carré(!) de textes et de photos aux informations relatives au 66ème Congrès Universel d'Espéranto qui se tiendra à Brasilia en juillet prochain... le tout rédigé en langue mondiale! Véritable vade-mecum du futur congressiste, ce n° spécial est un document touristique original qui incite indubitablement au voyage.

SUCCES 'DECONCERTANT' DU 12ème STAGE D'ESPERANTO PARLE ★

Organisé les 15 et 16 novembre à NANCY, il a en effet vu la participation de près de 80 personnes... jeunes et adultes venus de France, d'Allemagne, de Grèce... et de Hongrie! Cet engouement progressif, s'il pose quelques problèmes d'intendance aux organisateurs, est une preuve supplémentaire de l'intérêt porté à l'espéranto dans l'Est de la France. Le 13ème stage aura lieu à METZ les 27 et 28 juin 1981.

NIA DEKDUA STAĜO... ★

... okazis denove en NANCY la 15-16ajn de novembro kaj estis tre sukcesa. Entute aliĝis 83 personoj, sed finfine povis partopreni nur 76. La nombro de la kursanoj sufiĉe bone ekvilibriĝis inter la diversaj kursoj (unu semajnon antaŭe ekzemple al la kursoj B kaj D aliĝis po 20 personoj, sed en A1 nur 5! diversaj ŝanĝoj okazis lastminute). La subskribinto havis tempon zorgi nur pri administrado sed havis la impreson, ke ĉiuj kursoj funkciis pli vigle ol kutime. Vi povos legi ĉi-sube impresojn de kelkaj staĝanoj. La venonta (13a) staĝo okazos en METZ la 27-28ajn de junio 1981.

Ni aldonu, ke S-r^o GUILLAUME gvidis la kurson A1, S-in^o DENIS la kurson A2 (ambaŭ per Junulkurso), S-r^o LUDWIG la kurson B, S-r^o DENIS la kurson C (ambaŭ per propraj dokumentoj) kaj S-r^o De ZILAH la kurson D (pri literaturo: studo de la verko de Varankin "Metropoliteno").

... el S-r^o LUDWIG (gvidinto!)

"Sufiĉe -eble tro ofte- mi esprimas mian opinion en tiu-ĉi bulteno. Sed hodiaŭ mi ne povas rezisti kontraŭ la emo gratuli kaj danki al la B-kursanoj, kiuj laboreme kaj diligente partoprenis. Mi deziras al ili baldaŭan salton en la C-kurson!"

... el Michelle GEANT

"Mi estis en la 12a staĝo en Nancio kaj partoprenis en la kurso B. Ĝi estis bonega. Mi ankoraŭ neniam estis parolinta esperanton ĉar mi lernis la kurson perkorespondo: mi nur parolis laŭte, dum mi legis, dum la staĝo mi renkontis multe da personoj, kiuj estas junaj kaj maljunaj; ili elvenis el ĉiuj medioj. Tiel mi povis vidi, ke espertanto estas vivanta lingvo... Mi kredas vere pri esperanto kaj pri la pliproksimiĝo inter la diversaj landoj per E°."

... el S-r^o LÖWENBEIN (D Frankfurt)

"Mi scias, ke ne estas facile organizi kongresojn aŭ eĉ nur kongresetojn. Kiom da preparlaboroj, kiom da improviĝoj... La organizantoj de ĉi-tiu staĝo estis feliĉuloj. Ĉio funkciis -almenaŭ laŭ mia impresio- la impresio de iu, kiu venis de eksterlando kaj trovis ĉion pretan... Mi devas menciigi la tre modernan instrumentodon de E.LUDWIG... Speciale menciinda estis ankaŭ la libroservo... Mi tre ĝojis ĉeesti... kaj konvinkiĝis, kial la parolado de la internacia lingvo en fremda lando estas pli natura kaj facila ol en la propra!"

RAPORTETAS LA SEKRETARIO ★

Post la staĝo kunvenis la ĉeestantaj membroj de la komitato. Konstatiĝis, ke la informkampanjo per la peticio sendube estos sukceso. Nia Federacio eĉ akceptis okupiĝi pri tio landskale. Krome la ĉeestintoj fiksas la datojn de la venontaj aranĝoj. Bonvolu noti:

- Kongreso-prepara komitato-kunveno **22 an de februaro 1981**
- Federacia Kongreso en **NANCIO** **14/15 ajn de marto 1981**
- Parola staĝo: verŝajne 28/29ajn de junio en **METZ**

grave!

Por pli efikigi la laboron de la aktivuloj, oni kreis komisionojn, pri kiuj respondecas la jenaj komitatanoj kaj helpantoj:

Kulturo: S-in^o De ZILAH, 39 rue Joseph Hénot 57070 METZ

Informado: S-r^o LUDWIG, 46, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR

Instruado: "

Junularo: S-r^o VIVIER, 204, rue de Ravenne 54240 JOEUF

Ĉiu samideano povas sendi siajn ideojn, proponojn, helpon al la ĉi-supraj personoj.

nia vivo en...

NANCY

Unua kunveno por decidi pri nia agado dum la nuna lernjaro kunvenigis 16 personojn la 2an de oktobro. Simpla komunikado anoncis ĝin en la gazetaro kaj jam 5 novuloj dezirantaj lerni la lingvon ĉeestis.

Per 75 afiŝoj, 10 komunikoj al la gazetaro (sed bedaŭrinde ne ĉiuj aperis!) kaj 1500 flugfolioj, ni anoncis niajn novajn kursojn en la Junuldomo Ph. Desforges. Kvar personoj enskribiĝis en ĉiu kurso, respektive je la 18a30 ĉiujfaŭde kaj je la 20a30 ĉiumerkrede. La nunan kurson gvidas Andrée MARCHAL per nia kutima "Junulkurso". En la dua, Yves SCHEFFER eksperimentas la "Metodon11" de UFE.

En liceo G. de la Tour, la kurso por komencantoj rekomenciĝis la 20an de oktobro kun 2 gelernantoj. La nombro de gelernantoj kreskis ĝis 7, poste 10, sed nur je la 6a leciono jam regresis ĝis 3, kiuj tamen tre kontentige progresas per la "Nova racia Kurso".

Kunvenoj, funkciantaj kiel pliboniga kurso, okazis ĵaŭde je la 20a30, la 23an de oktobro, 6- kaj 20an de novembro, kun 4 ĝis 7 partoprenantoj. Ni studas la verkon de J.Valano "Ĉu li bremsas sufiĉe". La venontaj kunvenoj okazos la 4an de decembro, 8- kaj 22an de januaro. Dua serio de kunvenoj okazos merkredon la 10an de decembro kaj 14an de januaro. Ni ankaŭ provis kunvenojn por kanti (la 30an de oktobro) sed ni estis nur 5 partoprenantoj.

J.P. COLNOT

BAR-le-DUC

En la kadro de la urba ĝemelkomitato malfermiĝis kurso por komencantoj: 20 personoj partoprenas ĝin! La 2a-gradan kurson vizitas 10 homoj kaj la 3a^a 4 progresemuloj. Tio estas bona aŭguro por la estonteco. La itala kantisto Gianfranco Molle regalas 21 muzikŝatantojn en salono de la urba biblioteko la 28an de novembro, spite severan konkurencon de lirika koncerto la saman vesperon. "Brazila vespero" estas ankaŭ vidata en decembro. Ni aldonu, ke 7 Bar-le-Duc/anoj partoprenis la lastan staĝon de "parolata esperanto".

SELESTAT

Ni aparte devas gratuli nian sindoneman amikon GUEGUENIAT... al kiu ni ŝuldas 7 (jes ja! sep!) kursojn: 1- kaj 2-a gradaj en **Moulin de la Chapelle**, 1- kaj 2-a gradaj en la **kolegio** kaj du 1-a gradaj + unu 2-a grada en la liceo!
Kiu kapablas superi tiun rekordon?

EĤOJ DE LA 16a KULTURA SEMAJNFINO DE SEL


La 16a Kultura Semajnfino organizita de la Sarlanda Ligo, kiel kutime en la konferencejo Junkerwald en Blieskastel-Niederwürzbach, kunigis tri-dekon da partoprenantoj la 27/28ajn de septembro.

La kurson A gvidis Adolf Schärger (Kehl), la kurson B Daniel Luez studente la verkon de R.Schwartz "Anni kaj Montmartre", kaj en la kurso C prelegis D-r^o Tazio Carlevaro (Bellinzona) pri la historio de "Volapük". Entute plaĉa aranĝo, interesaj prelegoj, bona etoso, bedaŭrinde estis iom nesufiĉe da partoprenantoj por tiel valora aranĝo.

La venonta "K.S." en Junkerwald okazos de la 8a ĝis la 10a de majo 1981. La kurson C gvidos D-r^o J.C. WELLS pri la fonetiko de Esperanto.

J.P. COLNOT

PRIATENTU: La mandato de 3 komitatoj finiĝas:

 Gesamideanoj DEGRELLE, GROSSMANN kaj LONGUE-EPEE bonvolu anonci sian eventualan rekandidatiĝon jam antaŭ la kongreso al la prezidanto aŭ al la sekretario. Tutsame anoncu sin ĉiuj membroj de la Federacio, kiuj deziras iĝi komitatoj.

 ★
PERKORESPONDA KURSO

Pour cette nouvelle année scolaire, la trentième de fonctionnement ininterrompu de notre cours, il se produit un changement important: nous abandonnons le système par feuille (cours FERÉZ) dont l'édition est presque épuisée, le stock restant n'étant plus très présentable. N'ayant pu obtenir l'autorisation d'éditer ce cours à notre compte, une réédition complète étant de plus trop au-dessus de nos moyens, nous abandonnons, à regret il est vrai, un cours facile qui a formé deux générations d'espérantistes. Nous avons choisi le NOUVEAU COURS RATIONNEL qui nous a paru parmi les méthodes existantes, le plus complet et le plus clair. Nous avons pris l'initiative d'une cassette facilitant l'étude de la prononciation, et l'éditeur (l'Association SAT-Amikaro) a bien voulu en financer la réalisation. Tous les élèves des deux dernières années scolaires ont été avisés par une circulaire diffusée fin octobre de ce changement dans le fonctionnement de notre cours. Les élèves ayant choisi le cours par feuille et n'ayant pas terminé leur étude, sont priés de demander à leur professeur de leur faire parvenir les leçons restant à leur disposition. D'ici un an les leçons non réclamées pourront être détruites car nous ne pouvons garder indéfiniment un stock de leçons dépareillées.

Un changement intervient également dans la cotisation de notre cours: cette cotisation comprend désormais deux parties: 1/ le montant du livre de cours, actuellement 35F plus port recommandé 10F, soit 45F. Nous sommes au regret d'être obligés d'expédier nos livres en port recommandé, mais les PTT ayant égaré deux envois en un an et n'étant pas par ailleurs responsables des envois "simples", nous ne pouvons continuer à supporter les pertes! 2/ la cotisation de fonctionnement qui nous permet de "tourner" (relations avec la presse et les collaborateurs du cours, etc.) est fixée à 30 timbres-lettre, soit actuellement 42F. Cette cotisation de fonctionnement est devenue annuelle c'est-à-dire qu'un élève n'ayant pas terminé l'étude du cours élémentaire en un an devra en verser une nouvelle s'il souhaite continuer son étude sous notre direction. Les meilleurs résultats étant obtenus par les personnes qui terminent l'étude du cours en 4 à 5 mois, nous estimons qu'en un an chacun peut aisément, s'il le veut mener à bien cette étude.

J. P. COLNOT

Dans nos précédents numéros, nous avons donné les noms de 12 élèves du cours par correspondance 1979/80 ayant terminé le cours, quatre élèves supplémentaires ont terminé leur étude ou sont près de le faire. Ce sont:

Michel BERLAND (68000 COLMAR) dirigé par M. LUDWIG
 Rachel LE CORGNE (57160 CHATEL-St-GERMAIN) dirigée par Mme LERDUNG
 Odette BERNEZ (52000 CHAUMONT) dirigée par M. GROSSMANN
 Georges MOUGEL (88310 CORNIMONT) dirigé par M. GODART

Une douzaine d'autres élèves continuent l'étude.

Pour la nouvelle année scolaire, pour annoncer notre cours et le stage de novembre, nous avons envoyé à la presse 23 communiqués, dont 10 sont parus. Une trentaine de personnes ont demandé des renseignements, 8 nouveaux élèves sont inscrits.


OBJEKTIVO 10 000! peticio PRI LA LEĜPROpono "ESPERANTO EN LERNEJO"

Ne forgesu nian objektivon: 10 000 subskribojn en nia regiono!...

Ĝis nun alvenis ĉirkaŭ 30 folioj (kelkaj ne tute plenaj).

Konstattoj: a/ Multaj el vi petas novajn foliojn! Gratulon!

b/ 99% el la petitaj subskribantoj tre favore reagas...

Konkludo: Ne timu ekkomenci vian propran kampanjon, kiu daŭros almenaŭ ĝis nia Federacia Kongreso.



Ĉar ja temas pri kulturo
Libra kaj literaturo,
Mi do rajtas poezie,
Ŝerce sed ne elizie
La raporton mian fari.
Mi ne diris: sen erari!
Nu **cent okdek** specimenoj
Kapreolas en promenoj
Ĉu kongresaj, ĉu vortstaĝaj
Por fariĝi la furaĝaj...

Sortimentoj de Novuloj
Esperantaj, de Herkuloj
Lingvoplenaj. Ja, cent okdek
Por l'okulo al sorba lek'
Preta. Nun aŭskultu bone:
Verdlibreto, fanfarone,
Plej allogis: cent kvardek ok.
Elĉerpiĝis sage la stok'!
La **duparta praktikaro**
Kvardekfoje estis varo

Por helpadi komencantojn
Kaj konfuzi la pedantojn.
Gaŭlasteriks dudek kvine
Akompanis kvazaŭ ine
Grandvortaron de Gastono.
Tuj malantaŭ la **kaldrono**
Pretalkuras kiel diri,
Kiu diras sen deiri
Multajn dirojn plej diversajn,
Tre taŭgajn, eĉ perversajn.

La **Praktika Bildvortaro**
Eliriĝis dum la jaro
Po deknaŭ, kunul' sen ĝeno
De l' **ruĝMetropoliteno**,
Kiu sin doni post **Paŝoj**
Al plena posed' al Asoj
Kapablaj **bremsi** sufiĉe
(Po dekunu). Ne vertiĝe
Aĉetiĝis **Gajleganto**
Vivkolora: fadis frando!

Postvenas **lingvaj anguloj**,
Kiujn legis dek ekuloj.
Ĉu mi povis nu diveni,
Ke naŭ homoj por kompreni
Ĉiujn vortojn, ĉiujn frazojn
Eĉ por ĝui la ekstazojn
De l' beletro, senhezite
(Kaj por mi, uf!, senkredite)
La disĉiploj tutavive
De l' **vortaro tutavive**

Roger DEGRELLE
BP 23 - 54510 TOMBLAINE
CCP 2555 38 L NANCY

Ekfariĝus. Mia muzo
Ĉu daŭradi en l' amuzo?
Kial, fratoj samcelanaj,
Restas miaj vokoj vanaj?
Kial kuŝas sen espero
De aĉeto la sincero
De la Majstro? Liaj **Vivo**,
Fundamento sen motivo
Kun **Respondoj Lingvaj** koron
Vian ne altiras? Ploron

Mian egakcelas? Ĝoje
Inter zorgoj librovoje
La profito de la vendo
Incitas min al remendo
Baldaŭ **Tinĉjo kaj la Krabo**
Estos por vi Ora Rabo.
Mi rapidas tre testude
Al konkludo. Ege krude
Mi instigas plenavoĉe
Por vin logi legdiboĉe...

Ĉar se urĝas por vi varo,
Ne kalkulu kun monŝparo:
Nur aĉetu miaflanke,
Ĝim vi havos tuj semmamke.
Ĉar vi legis ĝis la fino
Kun atenta firmobstino
Mi donacos elegante,
Ke vi ĉiuj plenakore
Amos librojn eĉ mentore

Por la plezur' de via mens'
Kaj la matur' de via pens'
Ĉar ja temis pri kulturo
Libra kaj literaturo
Mi do rajtis poezie
Ŝerce, eĉ tro elizie
La raporton mian fari.
Mi ne diris: sen bizari.

TINĈJO

"LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ"

Mendu ĝin ĉe nia LIBROSERVO. Se vi pagas kun la mendo, vi ricevos ĝin sen sendkostoj. Sed faru tion antaŭ la 28an de februaro 1981.

Sur la dorsa kovrilo de la libro estas letero de HERGE, kiu favore parolos pri ESPERANTO.

Vi povos do mendi la libron por vi, via edzino aŭ edzo aŭ karulino aŭ filo aŭ filino aŭ amiko kaj amikino aŭ kamarado kaj kamaradino eĉ geavoj, kaj eĉ nur ne forgesu pagi mendante! por ĉiuj samtempe:

➔ **APEROS en MARTO 1981.** La bindita volumo aspektos kiel Asteriks sed estos maneskribita kaj enhavos 16 pliajn paĝojn. **PREZO: 25 FRF**



Vous venez de recevoir le n° 32 de LA INFORMILO, dernier n° de votre abonnement 1980

Afin de recevoir toute la série de l'an prochain, ainsi que les autres revues auxquelles vous êtes abonné(e) par ailleurs, nous vous invitons à vous acquitter de vos cotisations dès maintenant, cette procédure facilitant grandement notre travail tout en vous assurant un service ininterrompu de vos revues. Vous trouverez ci-dessous le nouveau tableau des cotisations pour 1981.

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national tant sur le plan informatif général que sur celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS?

1°/ Par virement postal à: *FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO*
(de préférence!) *CCP 1997 72 W NANCY*

2°/ Par chèque bancaire à l'ordre de la même Fédération (ce chèque doit être envoyé à notre trésorier, S-r° André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM)

TABLEAU DES COTISATIONS 1981

CAT	- de 22 ans	+ de 22 ans
1 - abonnement simple à LA INFORMILO _____	14 F	14 F
2 - adhésion simple à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO		
<i>membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)</i> _____	11F + 14 F	11F + 14 F
<i>membre fédéral sans abonnement (pour les autres personnes de la famille par exemple...)</i> _____	11F	11F
3 - adhésion à la Fédération et à l'U.F.E.		
<i>membre titulaire junior (avec la revue FRANCA ESPERANTISTO)</i> _____	73F + 14 F	
<i>membre titulaire (+ de 22 ans) avec la revue F.E.</i> _____		105F + 14 F
<i>membre sympathisant</i> _____	30F + 14 F	30F + 14 F
4 - adhésion couplée à U.F.E. et à U.E.A. (en plus de celle à la Fédération)		
<i>membre individuel (reçoit F.E. et l'annuaire de U.E.A. _____ + la revue KONTAKTO si moins de 25 ans)</i> _____	127F + 14 F	159F + 14 F 159F + 14 F
<i>membre individuel (reçoit F.E., l'annuaire de UEA et la revue mensuelle mondiale ESPERANTO... + la revue _____ KONTAKTO si moins de 25 ans)</i> _____	208F + 14 F	240F + 14 F 240F + 14 F

IMPORTANT ←

- A/ tous les membres reçoivent la carte fédérale et le bulletin trimestriel régional LA INFORMILO (pour les abonnés) * s'ils sont nouveaux adhérents
- B/ les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de UFE et de UEA (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1980 donnant droit aux services des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C/ les membres de l'enseignement sont invités à mentionner leur profession car ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE) sauf catégorie 2.
- D/ les jeunes jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance (inscription d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (JFEO) sauf cat. 2 Ils recevront en plus le bulletin KONCIZE.

E/ Les membres qui payent leurs cotisations par l'intermédiaire du GEE ou de JFEO ainsi que les membres à vie, voudront bien payer à part leur abonnement à LA INFORMILO comme indiqué précédemment.

F/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg, dont la trésorière est S-in° STAHLBERGER, 17 rue de Lampertheim 67800 BISCHHEIM, sont priés de verser leurs cotisations au

CENTRE CULTUREL ESPERANTO

CCP: 49917 STRASBOURG

en y ajoutant leur cotisation au groupe de Strasbourg... 10F

DENOVE NOTENDAJ (KAJ NOTINDAJ) DATOJ ★ ➔

Tiuj eventoj koncernas speciale niajn Federacianojn:

- de la 1a ĝis la 3a de majo: **Printempa Sogelo-Tago** en BAD-SÄCKINGEN
- de la 8a ĝis la 10a de majo: **Kultura Semajnfino** en JUNKERWALD, aranĝita de niaj Sarlandaj Samideanoj: prelegos en "supera" kurso Dr° WELLS pri fonetiko de Esperanto.
- de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto, **INTERNACIA SAT-KONGRESO** en **BAZELO** kaj **internacia feriosemajno** organizata de la Turista Asocio **NATURAMIKOJ Esperanto-Fako (TANEF)** Speciala aliĝilo por tiu semajno estas enŝovita en ĉi-tiu n° de LA INFORMILO

HAVINDA TURISMILO

Eblas ricevi senpage tre interesan broŝuron titolitan

SUPERRIGARDO PRI AUSTRIO

Skribu simple al la ĉi-suba adreso:

esperanto-redakcio de ORF (Austria Radio Vieno)

A 1041 Postfach 700, Argentinierstr. 30A

WIEN Autriche

ONI DIRIS AL NI, KE PER LA SAMA ELSPEZO ONI POVAS FABRIKI ĈU UNU OBUSON, ĈU 300 TAGMANGOJN...



FAITES VIVRE VOTRE PRESSE... **abonnez-vous !**

Toutes ces revues sont entièrement rédigées en E°. Celles dont le titre est précédé d'une croix sont à régler directement à U.E.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 PARIS. Les autres pourront être réglées à notre trésorier qui transmettra.

(chèque au libellé de la Fédération, envoyé à A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM F)

+ ESPERANTO	revue offic. de UEA	abonnement simple	mensuel	81F
+ KONTAKTO	revue pour adolescents et jeunes gens		4 n°s	41F
KONCIZE	bulletin européen pour jeunes gens		6 n°s	15F
KULTURAJ KAJEROJ	revue culturelle		6 n°s	50F
+ HEROLDO DE ESPERANTO	revue d'inform. format journal		18 n°s	64F
+ HOMO KAJ KOSMO	revue de vulgarisat. scientifique.		4 n°s	10F
+ LITERATURA FOIRO	revue littéraire		4 n°s	38F
+ JUNA AMIKO	style simple - parfait pour débutants		3 n°s	18F
MONDA KARUSELO	nouveau magazine en E°		4 n°s	10F
HORIZONTO	revue du "mouvement neutre" E°			40F
LA MIGRANTO	bulletin des "amis de la nature"			20F
+ SCIENCA MONDO				22F
+ INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO				25F
+ EUROPA DOKUMENTARO				45F

Les revues ci-dessus peuvent être considérées comme neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.

Celles qui suivent sont généralement qualifiées "d'engagées"

+ BIBLIA REVUO				36F
+ OOMOTO	revue japonaise (philos. relig.)		6 n°s	35F
ESPERO KATOLIKA				50F
FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO				15F
+ DIA REGNO	internationale (protestante)			45F
SAT-AMIKARO	bulletin mens. des trav. et syndic. franç.			52,50F
SENNACIULO	même tendance mais international			75F
+ EL POPOLA ĈINIO	de Chine Populaire - en couleurs		1 an	27F
			2 ans	44F
			3 ans	66F
+ LA KANCERKLINIKO	d'avant-garde, politique et culturel		4 n°s	24F

→ Il est en outre également possible de commander à notre trésorier des petites affichettes de propagande, format 20 X 5,5 cm - 5 textes différents sur papier de 6 couleurs différentes:

10 → 2,80 F franco, 40 → 5,50 80 → 10F



* Vous pouvez également vous procurer des vignettes gommées (4X3cm) de couleur verte. Chaque feuillet comprend 9 vignettes de textes différents.

2 feuillets (18 vignettes) 1,80F
10 FEUILLETS (90 vignettes) 7,20F franco de port
25 feuillets (225 vignettes) 17F

* Ont également un grand succès des CARTES DE VISITE qui présentent succinctement l'espéranto. On y trouve l'adresse de UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi.

Les 8 cartes : 4F → les 20 cartes : 9F

Figure aussi sur notre catalogue le lexique bien connu de F. LEGER (Espéranto-Français)

1 ex. — 6F + 2'20F = 8,20 2 ex. — 10F + 4,30 5 ex. — 20F + 6,30 F
10 ex. — 30F + 9F 20 ex. — 50F + 13,10F

Ces prix pourront être éventuellement réajustés au moment de la livraison.



angulo de l' pensulo

pri tiu rubriko respondecas
nur la aŭtoroj de la artikoloj.

REFORMULOJ REFORMAS... REFORMON!

Ne nur en Alzaco, ne nur ĉe la simplaj esperantistoj, la reforma malsano disvastigas ruinigon. Sed ankaŭ en Skandinavio kaj Aŭstrio... ankaŭ ĉe la Akademianoj.

En 1979, Akademiano V. SETĀLĀ kaj Profesoro B. COLLINDER proponas fiere sian "FUNDAMENTAN ESPERANTON SEN SUPERSIGNOJ". Komprenoble fundamenta estas nur dirmaniero. Tiu nova Esperanto malsimilas de la nia per la jenaj punktoj:

ĉ iĝas ch	ĥ iĝas x	ŝ iĝas sh
ĝ iĝas q	ĵ iĝas zh	ŭ iĝas w

La frazo "laŭ la ĵurnaloj, ĉi-tiu fuŝaĵo jam ŝanĝiĝas al ĥaoso" fariĝas apenaŭ rekonebla: "law la zhurnaloj, chi tiu fushazho jam shanĝiqas al xaoso"...

Oni vidas ke la fundamenteco estas ĉi-tie tute relativa! Sed ve! Tiu fundamenta Esperanto de Setälä kaj Collinder, siavice, estis reformita en 1980. Reformita de kiu? De SETĀLĀ komprenoble kaj de COLLINDER, kiu anstataŭas la malbonan ESPERANTON reformitan de SETĀLĀ kaj COLLINDER,

Kaj tiu Esperanto reformita de SETĀLĀ kaj COLLINDER, kiu anstataŭas la malbonan Esperanton reformitan de SETĀLĀ kaj COLLINDER, entenas la jenajn ŝanĝojn:

ch iĝas tx	sh iĝas x	zh iĝas j
q iĝas dj	w iĝas u	kaj x (nia ĥ) iĝas... ???...

Jes, koncerne la ĥ la mistero restas. Kaj la J iĝas I kiam ĝi sekvas vokalon, kaj ĝas

Y kiam ĝin sekvas vokalo. Vi trovas tion malsimpla? Sed kiu diris al vi, ke tio estas simpla? Reformo ne celas simpligon! La ĉi-supra frazo fariĝas do:

"lau la jurnaloi, txi tiu fuxaĵo yam xandjidjas al ???..."

Tiu-ĉi kaĉo estas, laŭ SETĀLĀ kaj COLLINDER, en plena humileco, la definitiva solvo.

Verŝajne, ke en 1981, tiu-ĉi esperanto reformita de Setälä kaj Collinder, definitiva fabrikaĵo, estos anstataŭita de alia esperanto bis-reformita far Setälä kaj Collinder, kiu estos la definitive definitiva solvo. Kaj ankaŭ tiu definitive definitiva solvo estos anstataŭita de...

Sed mi haltas. Vi jam komprenis la regulon de la ludo.

André CHERPILLOD

Noto de la redaktoro:

Ĵus aperis en diversaj internaciaj revuoj grava komuniko de la Akademio, kiu sendube ne plu permesos daŭre "ludi" kaj ĉesigos ĉiujn polemikojn. Jen tiu komuniko:

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO:

Malaprobo de reformoj

LA AKADEMIO de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniuj ortografiaj ŝanĝoj estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo kaj konformiĝas

perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko:

"Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u".

Oktobro 1980

Prezidanto: W. Auld
Sekretario: D-ro A. Goodheir

Entute en la jaro 1979 disaŭdiĝis 2983 radio-elsendoj per 14 stacioj dum 1082 horoj, inkluzive de kursoj. En la ĉi-supraj stacioj 2 (Sorocaba kaj Sabadell) disaŭdiĝis kursojn dum proksimume 30 horoj (ententataj en la sumo).



Al tiu ĉi listo oni devas aldoni diversajn elsendojn, precipe kursojn, periode dissenditajn per lokaj stacioj aŭdeblaj nur en tre malvasta areo kaj pri kiuj precizaj informoj ne estas haveblaj.

ESPERANTO

en radio

Ciutage:

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio** (Pollando), 41,27 m/7270 kHz, 48,90 m/6135 kHz, 50,04 m/5995 kHz, 75,85 m/3955 kHz, 200 m/1503 kHz.
- 12,00 — 12,30 — **Pekino** (Ĉinio), 19,34 m/15510 kHz, 30,43 m/9860 kHz (por Jap., Koreo).
- 14,00 — 14,30 — **Pekino**, 19,78 m/15165 kHz, 25,67 m/11685 kHz; por sud-orienta Azio.
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**, 31,50 m/9525 kHz, 42,11 m/7125 kHz.
- 21,00 — 21,25 — **Pekino**, 25,86 m/11600 kHz, 31,98 m/9380 kHz; por Eŭropo: inf., muz.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**, 41,18 m/7285 kHz, 49,22 m/6095 kHz, 50,04 m/5995 kHz, 75,85 m/3955 kHz, 200 m/1503 kHz.
- 23,30 — 24,00 — **Pekino**, 25,75 m/11650 kHz, 32,03 m/9365; por Latinameriko.
- Ĉiuj horoj laŭ MET (GMT+1 h.)**

Dimanĉe:

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**: «La semajno en Pollando»
- 06,54 — 06,55 — **Vieno** (Aŭstrio), 13,90 m/21575 kHz, 19,66 m/15260 kHz, 48,74 m/6155 kHz; ripeto de la sabata programo.
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**: «Panoramo de internaciaj eventoj», «Esperanto-ekspreso».
- 21,00 — 21,20 — **Romo** (Italio), 25,42 m/11800 kHz, 30,90 m/9710 kHz, 41,24 m/7275 kHz.
- 21,05 — 21,15 — **Vatikano**, 19,84 m/15120 kHz, 25,64 m/11700 kHz, 31,10 m/9645 kHz, 31,17 m/9625 kHz, 41,38 m/7250 kHz, 48,47 m/6190 kHz, 196 m/1530 kHz; informoj, intervjuoj, koresp.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**: «La sem. en Pol.».

Lunde:

- 00,00 — 00,15 — **Rio de Janeiro** (Brazilo), 214 m/1400 kHz; dissendo spiritisma.
- 01,00 — 02,00 — **Sorocaba** (Brazilo), 278 m.
- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**: «Esperanto ekspreso» (rip.).
- 19,00 — 19,10 — **Berno** (Svislando), 31,46 m/9535 kHz, 48,66 m/6165 kHz, 75,28 m/3985 kHz.
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**: Komentario.

- 21,30 — 21,40 — **Berno**, 16,83 m/17830 kHz, 16,89 m/17760 kHz, 19,78 m/15170 kHz, 3146 m/9535 kHz, 48,66 m/6165 kHz, 75,28 m/3985 kHz.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**: «Aŭskultantoj por aŭskultantoj».

Marde:

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**: «Aŭskultantoj por aŭskultantoj» (ripeto).
- 23,45 — 24,00 — **Zagrebo** (Jugoslavio), 262 m/proks. 1145 kHz.

Merkrede:

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**: «El la temoj de la semajno».
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**: Komentario.
- 22,30 — 22,45 — **Sabadell** (Hispanio), 187 m/1602 kHz; informoj kaj kurso.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**: rip. de mateno.

Ĵaŭde:

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**: Aktuala koment.
- 07,10 — 07,25 — **Vatikano**, 96,5 MHz, 93,0 MHz, 19,84 m/15120 kHz, 25,55 m/11740 kHz, 25,61 m/11715 kHz, 31,10 m, 31,17 m, 41,38 m, 48,47 m.
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**: Komentario.
- 18,50 — 18,55 — **Vieno**, 89,8 MHz.
- 19,00 — 19,10 — **Berno**, ondoj kiel lunde.
- 21,30 — 21,40 — **Berno**, ondoj kiel lunde.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**: «Leterkesto».

Vendrede

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**: «Leterkesto» (rip).
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**: Pollando hodiaŭ.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**: «Kalejdoskopaj informoj el Pollando».

Sabate:

- 06,00 — 06,30 — **Varsovio**, ripeto de la vesp. progr. de vendredo.
- 16,30 — 17,00 — **Varsovio**: «La semajno en Pollando».
- 17,45 — 17,55 — **Vieno**, 19,28 m/15560 kHz, 30,71 m/9770 kHz, 48,74 m/6155 kHz.
- 19,00 — 19,10 — **Berno**, ondoj kiel lunde.
- 21,30 — 21,45 — **Valencia** (Hispanio), 358 m/836 kHz.
- 22,30 — 22,55 — **Varsovio**: «Panoramo de internaciaj eventoj», «Esperanto-ekspreso».

Kelkaj adresoj: Radio Polonia, Esperanto, p.k. 46, PL-00-950 Warszawa; Radio Pekino, Esperanto, Beijing; Radio Roma, Esperanto, p.k. 320, I-00100 Roma Centro corr.; Radiovaticana, Esperanto, Piazza Pia 3, I-00193 Roma; Svisa Radio Internacia, Esperanto, CH-3000 Bern 15; ORF, Esperanto, A-1136 Wien; Radio Zagreb, Esperanto, YU-41000 Zagreb; Radio Clube de Sorocaba, Esperanto, cx postal 234, BR-18.100 Sorocaba SP; Radio EAJ 20, Esperanto, C. Convento 22, Sabadell; Braz. Spiritisma Fed. av. Passos 30, BR-20.000 Rio de Janeiro ZC 58; La Voz de Valencia, Esperanto, av. del Cid 154, Valencia 14.

Skribu!

... por gratuli!


Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Pri aliaj horzonoj v. en la Jarlibro 1989, p. 89. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.



distra angulo



— KRUC-VORT-ENIGMO *



HORIZONTALE

1 Rakonto verkita de Kenneth G. Linton (3 vortoj). 2 Paŝe, veture, fluge, ktp - Aŭdi gi sian voĉon - malgranda laboro kun dornoj. 3 Numeralo - malpravi - vivanta homo aŭ besto. 4 Pronomo - Per kio oni malice influas - estrata de kapitano - direkti kaj estri (rad). 5 Objekto, afero, ideo - plektaĵo - granda insulo - rektangula. 6 Ne nur sed plie - verba sufikso - mortigi - traŭbo (rad). 7 Akcentanta adverbo - varmega, fervora - enŝpruci. 8 Granda itala urbo - noto - flava mineralo - prepozicio. 9 Elvoki, ne uzante la vorton - Ŝtopi - en kelkaj fruktoj. 10 Ŝtonetkreskaĵo imponeco - tio akompanas foriron. 11 Piki-

lo (rad) - entenanta nenion - absolute necese. 12 Kreskaĵo uzata kiel furaĝo - bruo de insektoj. 13 Larĝa aleo - aervibrado - krustuloj.

VERTIKALE

1 Tri vortoj por unu demando - havena baseno (rad). 2 Havi kurban formon - anstataŭa onklo - rabobesto. 3 Rifuzi - rilate al aziaj antikvaj triboj - per ĝi oni stiras ŝipojn. 4 El la antikva Etiopio - filo aŭ filino. 5 Ĝi montras la nomon de ĉiu noto - dorsosako. 6 Monero (rad) - pli malpli cirklo - plej zorge gardi. 7 Prefikso - akirita per mono - guma rezino. 8 Muzikinstrumento - vadbirdo (rad) - sportilo. 9 Prepari manĝon (rad) - politika unuiĝo (rad) - mallonga vipo. 10 Vojo en ĝardeno - la sama onklo - iom da verdaĵo. 11 Ĝi ricevas ovojn - prefikso - akva kreskaĵo (rad) - sufikso. 12 Li ludas rolon - Fidema, naiva. 13 Kovranta vestaĵo - remeti en staton de funkciado (rad). 14 Grasa, milda - pronomo - prepozicio - varmego. 15 Insektomanĝulo kiu vivas en rivero - inversigita prepozicio - malordigita loko.

PRIATENTU... La punkte signitaj kvadratoj ("nordokcidente sudorienten" legataj) direktas apostrofon al la solvonto! Bonan kuraĝon!

FAMILIA PROBLEMO!... *Mi edziĝis kun vidvino. Ŝi havis aĝan filinon. Mia patro vizitis nin ofte; li amindumis al mia duonfilino kaj fine edziĝis kun ŝi. Sekve mia patro fariĝis mia bofilo kaj mia duonfilino mia patrino. Iom pli poste mia edzino donacis al mi filon. Li estis kompreneble la bofrato de mia patro kaj mia onklo. La edzino de mia patro, t.e. mia duonfilino ricevis ankaŭ filon kiu iĝis mia frato kaj samtempe mia nepo. Mia edzino estas sekve mia avino: ŝi estas la patrino de mia patrino. Mi do estas la edzo de mia edzino kaj samtempe la nepo de mia edzino, sekve mi estas mia propra avo!... Ĉu ne terure?*

Solvoj de la enigmoj (N°j 31 kaj 32) aperos en la venonta INFORMILO.

Internacia Ferio- Semajno 1981

Organizita de la
Turista Asocio
'La Naturamikoj'
Esperanto-Fako



TANEF

8.-15. aŭgusto 1981 en Luzern (Svislando)

Post la 54-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kiu okazas de la 1.-8. aŭgusto en Bazelo, vi ĝuos agrablan, varioplenan semajnon en bela montara regiono de Svislando.

En la Studenta Hejmo ni povas akcepti 150 partoprenantojn, pro tio vi ankaŭ povas inviti konatulojn kiuj ankoraŭ ne scias la internacian lingvon, kondiĉe ke ili partoprenu Esperanto-kurson por komencantoj matene. Posttagmeze kaj vespere ĉiuj kune ekskursos, faros vizitojn kaj distriĝos. Tial komencantoj povas konatiĝi kun Esperantujo.

Eblas sin bani en la lago tuj apud la Studenta Hejmo.
Bonvolu kunporti propran tualettolaĵon.

Kostoj: Plenkreskuloj (pli ol 15 j.) SFr. 360.-; junuloj 10-15 j. SFr. 340.-;
Infanoj 6-10 j. SFr. 320.-; infanoj malpli ol 6 j. SFr. 300.-.

Aliĝkotizo: por persono SFr. 10.-; infano malpli ol 15 j. SFr. 5.-.

Bonvolu atenti, ke aliĝo validas nur, se vi kun la aliĝo pagas minimume la duonon de la menciitaj kostoj kaj la aliĝkotizon. Kompreneble vi povas ankaŭ pagi tuj la tutan sumon.

La prezo inkluzivas loĝigon en 1-/2-lita ĉambro, 3 manĝojn (inkl. 2 dl. sen-alkoholan trinkaĵon) tage, ekskursojn al mondfamaj lokoj, vizitojn, Esperantokurson por gastoj, littolaĵon kaj impostojn. (Lerno-libro estas aparte pagenda).

ALIĜILO

Mi/Ni aliĝas al la Internacia Feriosemajno kaj antaŭpagas SFr.

Nomo Antaŭnomo Sekso

Antaŭnomo de la edzino Mi/Ni aliĝas entute personojn

Antaŭnomoj de la infanoj kaj sekso

Strato kaj n-ro

Poŝtcif. kaj urbo Lando

Mi/Ni aliĝas al la Esperanto-kurso persono(j)n / vegetarano jes ne

Dato kaj subskribo



Dum la Internacia Feriosemajno vi ĝuos inter alie jenajn ekskursojn kaj vizitojn:

Tuttaga ekskurso al la Alpoj

Dum la tuttaga ekskurso ni transveturas la pasejon Furka, ĝi estas la akvodislimo inter Rodano kaj Rejno kaj kantona limo inter Uri kaj Valezo. Ĉe la Rodana Glaciejo, ni atingas pere de koridoro hakita en la glacio, glaciejan groton kaj glacikatarakton. Ni daŭrigas la vojaĝon transveturante Grimsel-pasejon de kie ni ĝuas belan elvidon al Finsteraarhorn (4074 m) kaj al Lauteraarhorn (4042 m). Preterveturante la artefaritan Grimsel-lagon ni atingas Innertkirchen (Aare-montogorĝo) - Brünig-pasejon - Luzern.

Duontaga ekskurso al monto 'Rigi'

Dum la veturado al Rigi vi ĝuos ŝanĝiĝantajn vidaĵojn. Ne malprave la monto Rigi estas nomata la "reĝino" de la svisaj montoj. Suverene ĝi staras inter la Kvarkantona Lago kaj Lago Zug, dum ĉiuj aliaj montoj grupiĝas en respektoplena distanco ĉirkaŭ ĝi. Sur la pinto, iom pli alte ol la stacidomo, troviĝas la hotelo Rigi Kulm (1800 m).

Duontaga ekskurso al monto 'Pilatus'

La fiera roko-piramido Pilatus (2132 m), ne tre malproksima de Lucerno, tuj frapas la okulojn. Survoje vi entuziasme ekkaptos elrigardojn malsupren al la urbo Lucerno kaj al Kvarkantona Lago, Centra Svislando, Nigra Arbaro kaj Vogezoj. Starante sur la teraso de Pilatus vi ĝue rigardos montĉenon, kiu etendiĝas de la monto Säntis en la oriento ĝis Les Diablerets en la okcidento, kaj en kies mezo amasiĝas la gigantoj Eiger, Mönch kaj Jungfrau, kronitaj per eterna neĝo.

Vizito de la Glaĉera Ĝardeno

La tutmonde konatan Glaĉeran Ĝardenon oni malkovris en 1872. Eratikaj blokoj venintaj el Alpoj, grandegaj rulŝtonaj kaldronoj, glaciejaj sulkoj liveras al ni pruvojn pri la glaĉera periodo. La plej granda, tielnomata "giganta kaldrono", estas pli ol 9 metrojn profunda.

En tiu roko mem troviĝas atestantoj datiĝantaj de periodo ankoraŭ pli antikva de la geologia historio: jen palmfolioj, jen markonkoj kaj ŝtoniĝintaj sulkoj, kiuj pruvas la ekziston de subtropika marplaĝo kovrita de palmoj - antaŭ dudek jarmilionoj - sur la faco de la Lucerna regiono.

Vizito de la Svisa Trafikdomo kaj Planetario

La plej granda trafikmuzeo de Eŭropo prezentas en viveca aspekto la evoluon kaj gravecon de ĉiuj transportiloj surakvaj, surteraj kaj enaeraj, kiel ankaŭ de la universa veturado, de telekomunikiloj kaj turismo.

La sola planetario de Svislando. Ekipita per la plej moderna Carl-Zeiss projekciilo, ĝi havigas imponan imagon pri la firmamento kaj la movigoj de la astroj. Tagoj, monatoj kaj jaroj fariĝas minutoj kaj sekundoj. La planetario, la aktuala instruilo en epoko de la universa veturado fariĝas la impona travivaĵo por ĉiu.

Esperanto-kurso, prelegoj kaj distraĵoj kompletigos la programon.

Se unulita ĉambro ne plu estas disponebla, mi konsentas loĝi kun alia kongresano en dulita ĉambro. (Se vi ŝatas loĝi en sama ĉambro kun certa persono, bonvolu notities nomon).

.....

Korespondadreso kaj akcepto de aliĝiloj:

Erna Döring, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando

Kasisto: Mauro De Sassi, Nordstrasse 123, CH-8037 Zürich, Svislando

Pagu al: Gen. Zentralbank, CH-8001 Zürich, poŝtkonto 80-2128

Dorsflanke nepre skribu: Favore al 243 235 TANEF (IFS)